FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TF

N° 63a (nova serio) - N° I48

SINO LEMARCHAND MARYSE
43 RUE DESSEAUX
76100 ROUEN

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. N° 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20Fr. Subtena = ek de 30 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco = 20 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

## 83 F I N I S . . . . V I V U 84 !

Kompreneble, ni ne povas fanfaroni pri U.N.E. dum tiu pasinta jaro 1984 : nek pri la organizado de renkontiĝoj, nek pri la aperado de la Bulteno . . .

Pri la bulteno, ni devas memori ke, jam de kelkaj jaroj, nia amiko Pierre Lemarchand, la eldonanto, serĉis anstataŭanton ; li eĉ, en la Ĝenerala Kunveno en Etretat, proponis malpli oftan eldonadon , kun celo ŝpari monon por la Asocio, sed ankaŭ tempon por la respondeculo : unuanime, la ĉe-estantaro balotis por daŭrigo de kvarfoja eldono dum la jaro ... oni eĉ trovis rimedon por solvi la financan flankon de tiu problemo, sed, por renovigi la homan energion : ne !

La Sorto estis ankaŭ kontraŭ ni por la renkontiĝoj : la organizantoj de la Kongreso okazonta en CAEN en Majo 83 frontis al la postuloj de la luantoj kiuj nepre volis scii la ĝustan nombron de la partoprenontoj rapide, dum la aliĝiloj alvenis malrapidege ....

Alia bato ĵus trafis nin por la okazonta Ĝenerala Renkontiĝo en BAYEUX, fine de Marto 84 : la respondeculo de la Hejmo de Junaj Laboristoj, promesinte la lokon, devis poste rekonsideri tiun promeson , pro rekvizicio de la ejo, fare de urbestrarano, por la bezonoj de la urbaj instancoj : denove, niaj sud-normandaj organizantoj ne povis riski misan anoncon !

.../...

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais.
Le Gérant : Pierre LEMARCHAND - Dépôt Légal Ier trimestre I984

.../...

SED , TAMEN , niaj Gesamideanoj el CAEN invitas vin por inter-amika renkontiĝo senprotokola, dum Sabato 24a de Marto . Vi tuj rigardu la anoncon sur apuda paĝo kaj vi konigu rapide ĉu vi partoprenos al la komuna tagmanĝo .

La kaskado de malagrablaĵoj kiuj trafis vin, karaj Normandoj, estas en traktado de la Estraro ; ni konscias ke ni devas trovi solvon al du ĉefaj problemoj :

I) Malkovro de agema respondeculo por la bulteno ( ni memorigas ke la nuna estrar-skipo deĵoras de dek jaroj )

2) Decido kaj antaŭluado de kongresloko longe antaŭ la okozontaĵo. ( ofte, la asocioj luas unu jaron antaŭe )

Tiuj organizaj mistrafoj sentiĝis ĉe la membroj : telefonalvokoj, kartoj kaj leteroj alfluis ! Krome, oni ne dubas ke kelkaj inter vi deziris alskribi, sed sin detenis pro ĝentileco ne sendi grumblajn vortojn!

Feliĉe, tiu dormemo de la Normanda Unuiĝo tute ne signifas ke la provinco sinkas en letargio ! Pluraj Grupoj aktivas : CAEN-regiono " tiklas" la gazetaron kaj radion de la regiono ; LE HAVRE instaliĝis en propra ejo ; ROUEN kreas oficialan grupon ,kaj sin pretigas por grava agado... tie kaj tie aliaj grupoj planigas regulajn kunvenojn, ktp...

PLIE, NEPRE NE FORGESU KE , post tri jaroj, grava datreveno instigu nin al firma agado : EN I987 , la Esperantanoj de la tuta mondo festos la centjaran aĝon de Esperanto ! . . . . kaj la Normandaj Gesamideanoj festos la 40an datrevenon de la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj !

DO, eble Sorto ne favoris la funkciadon de nia Asocio dum I983, tamen, tio ne estas motivo por mallevi la brakojn ! kontraŭe !

Kaj, kun ĝis-revida saluto al CAEN ,

Ni diru : VIVU 84 !

Johano Ĵibo

\+ + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + + +

UNE INITIATIVE UTILE

L'Union Française (4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris) et la troupe de théatre " La Chrysalide" (I5 rue de Clermont - 46I00 Figeac) ont monté une Information-spectacle sur l'Esperanto " BABEL AUJOURD'HUI"

C'est un outil d'information, une nouvelle arme de persuation à la disposition des Groupes, ou même des esperantistes isolés, pour les aider à renouveler l'audience de l'Esperanto en France .

Ecrivez pour informations

# K U N V E N O   E N   C A E N

LE CONGRES prévu pour les 24 et 25 Mars à BAYEUX ne pouvant avoir lieu, le Groupe de CAEN organise une " REUNION SANS PROTOCOLE "

<u>SAMEDI 24 MARS</u>

<u>I) MIDI</u> Repas en commun au Buffet de la Gare

( hors d'Oeuvres, entrée, viande, fromage, bombe glacée )
= 80 Fr. Vins et Service compris -

Arrivée : prendre la direction Ventre-ville jusqu'à la gare, passer sous le pont puis, à 50m à droite, au n° 53, entrer dans la cour-parking SNCF.

<u>2) VERS I5 H</u> Dans la cour SNCF: première porte à gauche : Salle de Réunions (éventuellement, organisation d'une promenade dans Caen )

<u>SI VOUS DESIREZ</u> participer au repas, merci d'avance d'en aviser, avant le I5 Mars, M.Gilbert ANGENAULT
23 route d'Asnelles - I4II4 VER SUR MER
Tel. (3I) 22 22 86

# V I V O   D E   L A   G R U P O J

## Y V E T O T

<u>Kursoj</u> unuagrada ĉiuĵaŭde je la I8h30
duagrada ĉiulunde je la I7h30

<u>Monataj Kunvenoj</u> okazas la 3an Vendredon de ĉiu monato je la 20h30
25 allée des roitelets .
Januaro : planigo de ekspozicio okazonta en la urba biblioteko dum Oktobro I984

<u>Reĝkuka Festo</u> Se ni ne havus tiun kutiman jaran renkontiĝon, oni povus paroli pri malhonesteco kontraŭ la pasintaj jaroj ... Trideko da personoj renkontiĝis kun la sama plezuro, gustumante la tradician kukon por malkovri la fabon, rivelanto de efemera kronado. Gazetoj fotadis kaj favore raportis .

## C A E N

<u>Kursoj</u> Ĝis nun, ne ankoraŭ organizita kurso por la unua grado
Progresiga kurso okazas ĉiulunde kun sep/ok partoprenantoj .

<u>Monataj Kunvenoj</u> Ĉirkaŭ dek/dekdu personoj kunvenas regule .

<u>Informado</u> La Asocio "Union Artistique des Cheminots " organizas ekspozicion de pentraĵoj de la I8a ĝis la 25a de Februaro : sufiĉe grava spaco estas rezervita por samtempa prezento de esperantaĵoj.

Sekve de respondo de S-ro Angenault al artikolo kiu traktis pri la malfacilaĵoj lingvaj en la internatiac rilatoj, ĵurnalistino, dum du horoj, lin intervjuis : rezultis interesa, kvarkolona artikolo kun pluraj fotoj plus anonco sur la frontpaĝo de " La Renaissance du Bessin " , Vendredon la tria de Februaro .

# V I V O   D E   L A   G R U P O J (sekvo)

**L E   H A V R E** La <u>ĜENERALA KUNVENO</u> okazis la I5an de Oktobro . Prezento de la Morala kaj Financa raportoj ; Baloto por nova komitato: S-ino Lucas eksiĝas , ankaŭ Laŭrenca Caron pro prefesiaj okupoj . Al ambaŭ ni adresas niajn varmajn dankojn (ni memoru ĉi okaze ke Sinjorino Lucas estis prezidantino de la grupo dum pluraj jaroj ) . Ni gratulas al Agnès Madur kiu eniras en la komitaton, kiel S-ino Peltier kiu denove servas,kaj kiun oni povas konsideri kiel la motoro de la nova ejo .

<u>Inaŭguro de la Nova Ejo</u> La Grupo en Le Havre estas verŝajne pli ol okdek jara ; tion ni ne povas ankoraŭ pruvi pro perdiĝo de la arkivoj ( trapaso de du militoj kaj inundoj de la biblioteko ) sed ni traserĉas nian naskiĝdaton... La loko kie okazis niaj kunvenoj daŭre estis ĉambro pruntedonitaj de la urbaj instancoj (Lord Kitchener ĝis I939a , Jules Lecesne ĝis I960a , kaj fine François Ier . Nun, dank'al la afabla propono de la Naturamika Asocio en Le Havre, ni instaliĝis en la granda domo kiun ili ricevis por siaj aktivecoj ; ni troviĝas en komuneco por la ĉefaj instalaĵoj, kaj kun propra ĉambro . Tiu loko trankvila devus helpi al niaj kunvenoj kaj ebleco de kursoj . Ĝi prezentiĝas por la tuta grupo vera instrumento de laboro : ni kuspu la manikojn !

Ĉirkaŭ 55 personoj vizitis la lokon kie estis aranĝita ekspozicio pri esperantaĵoj ( paneloj; gazetoj, libroj, ktp . )
Favora artikolo kun foto aperis en la gazetaro .
Koktelo agrabligis la aranĝon, kaj ni kaptas la okazon danki al niaj grupaninoj kiuj ĝin tiel lerte kaj agrable preparis .
Fine, gravan dankon ŝuldas la grupo al du membroj kiuj kontribuis, unu per malavara subteno, alia per sia dinamisma entrepreno .

<u>Adreso</u> por la eventualaj vizitantoj : II rue Palfray - 76600 LE HAVRE
Kie ĝi troviĝas ? = sude de la fervoja stacidomo , apud la stacio de la eksterurbaj aŭtobusoj .

<u>Kursoj</u> Unuagrada ĉe la M.J.C. , sed kun malmulte da interesatoj ( informoj apud Alain Chalm 8 pl. Albert René .Tel 2I I0 25

Duagrada, por la Naturamikoj, do ĉe la ejo; tiun kurson sekvas ankaŭ pluraj membroj de la grupo, kiuj volas refreŝigi sian konon de la lingvo (ĉiumarde I8h30 )

Konversacia rondeto ĉe liceo Porte Oceane : ĉiumerkrede I9 h .

<u>Monataj Kunvenoj</u> La nombro de la vizitantoj iom post iom pligrandiĝas: tio pruvas ke, en taŭga loko, la renkontiĝoj estas pli agrablaj . Ni pardonpetas ne prezenti resumon pri la pasintaj paroladoj; pro manko de loko ĉi tie ; ekzistas propono pri eldono de ili en iom malpli koncizа formo ol la kelkliniaj tekstoj en la bulteno .

Estontaj Temoj :

| | |
|---|---|
| 2I.0I.84 | " Pano por la Sano " ( N.Peltier) |
| I8.02.84 | " Akvo, vivo-fonto " (M.Huet) |
| I7.03.84 | " Ĉu vi ŝatas glaciaĵojn ? " ( L.Caron) |
| 2I.04.84 | " Toksemuloj " (A.Madur ) |
| I9.05.84 | " Por aŭ vesta uniformiĝo - modo (J.Sery ) |
| I6.06.84 | " Pollando, mia patrujo " ( S-ino Paprocka ) |

# A L I A J   A S O C I O J   K U N V E N A S

**T A N E F** ( La Naturamikoj Esperantistaj ) organizas Internacian Ferio-semajnon, de la I9a ĝis la 26a de majo en la Naturamika Domo : "Pension Gnaid " , en la klimata kuracloko Dorf Tirol, supre de Merano, Italio .= Vizitoj, migradoj, ekskursoj, ĝis Dolomitoj ...

Kostoj por Naturamikoj : SFr. 380    por ne-membroj : SFr. 430

Informoj kaj aliĝo al T A N E F ,poŝtfako 225 , CH-4003 BASEL Svislando.

**J E F O** ( Junulara Esperantista Franca Organizo )

Organizas sian jaran Franc-Germanan renkontiĝon en la urbo Le Havre, de la IIa ĝis la I8a de Aùgusto .

Junuloj de pluraj landoj estas atendataj .
Substrekinde ke la "Office Franco-Allemand pour la Jeunesse " subtenos finance la renkontiĝon .

**TRIA SEJNA ESPERANTO-RENDEVUO** Ekde vendredo la 23a ĝis lundo la 26a de marto , en Mesnil-Saint-Père, apud Troyes (Aube)
Tri paralelaj studgrupoj : komencantoj, progresantoj,fluaj parolantoj .
Prelegoj Vesperaĵoj kun muzikaj gastoj Max Roy Carrouges kaj Jp Bergeon/ Ekzamena sesio de Franca Esperanto-Instituto, Ekskursoj en l;a regiono...
La Rendevuo estas organizata de la Kooperativo de Literatura Foiro , kunlabore kun la Esperantista Centro Aube/ Informoj : Suzanne BOUROT - I5 B rue Morel-Payen - I0 000 TROYES. Tel (25) 8I 26 5I

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

## ĴUS FINIĜIS LA J A R O DE K O M U N I K A D O

Jen la opinio pri Esperanto, kiun esprimis la fama biologiisto Jean ROSTAND, membro de la Franca Akademio :

" Estas ne penseble, ke biologiisto ne salutu fervore la ideon de universala lingvo, komuna por ĉiuj homoj .

Se tia lingvo estus pli disvastigita, ĝi permesus al ĉiu scienculo esti rekte informita pri la laboroj - kiuj, ĉiumomente, en la tuta mondo , progresigas lian fakon. Kaj precipe, konsiderante ke la homaro konsistas el unu sola specio, lerninte vidi en la rasaj kaj naciaj diferencoj nur bagatelan fakton, ĉu ni devas, senhezite, deziri ke ĉiu Homo Sapiens estu dotita per unu sama esprimilo ?

La unueco de la homa specio vokas komunecon de la lingvo. Ju pli intimaj fariĝos la rilatoj inter la popoloj, ju pli " planediĝos " la tero, laù la vortoj de Teilhard de Chardin, des pli necesos ke la teranoj disponu lingvon kiu estus, iamaniere, la VORTO de la specio .

Miaflanke, mi esperas, ke la momento ne estas tre malproksima, kiam ĉiuj homoj, dank'al Esperanto, kapablos interkomunikiĝi same kiel faras, per siaj dancoj, ĉiuj abeloj ... "

Le Groupe Espéranto de la Région Rouennaise,
Le Centre Culturel d'Espéranto d'Yvetot,
Le Centre Culturel d'Espéranto des Andelys,
en collaboration avec la Maison des Jeunes et de la Culture de ROUEN Rive Gauche, présentent :

## L'INFORMATION PAR LE THEATRE :

VENDREDI 4 MAI 1984 À 20H00 DANS LA SALLE DU FOYER DE LA MAISON DES JEUNES. 114 AVENUE DE BRETAGNE 76100 ROUEN RIVE GAUCHE. (FACE AU CENTRE COMMERCIAL ST SEVER)

## "BABEL AUJOURD'HUI" OU "VOTRE LANGUE M'INTERESSE"

Une information - spectacle sur la Langue Internationale

Création collective du THEATRE de la CHRYSALIDE (Figeac - Dordogne). Comédiens : Thierry Salgues, Arno Lagrange, Aline Fabre. Mise en scène : Kimmich et Françoise Van Caneghem. Produite par l'Union Française pour l'Espéranto.(Paris).

*RESERVEZ DES AUJOURD'HUI CETTE DATE !*

*PREVOYEZ D'Y AMENER VOS AMIS ET CONNAISSANCES*

*SPECTACLE - DEBAT - EXPOSITION .*

PRIX DES PLACES : 30.00 FR. ENTRÉE GRATUITE POUR LES ENFANTS.

Contact local : Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN.
Téléphone : (35) 72.71.17.

---

LES ANDELYS - GRUPO INVITAS VIN AL :

## JUGOSLAVA POSTTAGMEZO !

DIMANĈON LA 25 AN DE MARTO 1984 JE LA 14H30 EN "MAISON POUR TOUS - MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE" RUE MAURICE DELARUE 27700 LES ANDELYS.

kun juna Jugoslavino : SAŜA SIROVEC kiu nuntempe loĝas en Parizo kaj partoprenas en TESPA : Teatro Esperantista de Parizo.
Ĉe la fino de la prezentado de lumbildoj pri Jugoslavio, ni kune trinkos kaj manĝos specialaĵojn de tiu lando.
Senpaga partopreno !

*Bonvolu resendi al Sylvie BONNET 32 rue de la Madeleine 27700 Les ANDELYS. Tel.: (32) 54.31.09. vian aliĝilon :*

---

MI PARTOPRENOS LA "JUGOSLAVAN POSTTAGMEZON"
LA 25AN DE MARTO EN LES ANDELYS.

MI VENOS SOLE.
MI VENOS KUN ALIAJ PERSONOJ.

*(bonvolu forstreki la nenecesan informon.)*

NOMO : ____________ ANTAŬNOMO : ____________

ADRESO : ____________

____________

DATO : SUBSKRIBO :